

## & La diversaj aĝoj de l' homo:

< Ripete 19 sed rekante 10 el 32 batoj por strofo, entute 320 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio modifita (pli- kaj malpli-longigita) de József Dinnyes (Al venko!, 1986), nova rekantaĵo kaj samformigo na la lasta strofo per nova verso (vorto Mesaĝo).>

### (#Melodio:

<:32> (o;So /mire doLa SoLa SoLa a;So mire doLa SoLa SoLa a;So SoRe e e;So /SoDo o

(#Rekantaĵe: o;So mire doLa SoLa SoLa a;So mire doLa SoLa SoLa)

a;So SoRe e e;So SoDo o

)×10 )+

### (&Strofoj:

'1 En /supra ĉambro, lulo... lulo... ;  
Anĝele dormas la etulo: (':; Etaĝo.) (,;;  
Etaĝo.)

(×:; **Kaj dum ni dancon plue paŝas ;  
Al vi mi aĝon jen malkaŝas:**) (,;;  
Etaĝo. Etaĝo.)

'2 Sed baldaŭ li el dorm' sin ŝiras ; Kaj  
pri la bela mondo miras: ; Miraĝo. ....

'3 Jam ne plu side li tamburas, ; Sed tra  
la dom' explore kuras: ; Kuraĝo. ....

'4 Kun vundoj li (kaj sen rubandoj) ;  
Revenas el stratbubaj bandoj: ;  
Bandaĝo. ....

'5 Kaj baldaŭ sekvas li kun ĝojo ;  
Knabinon ĉien sur la vojo: ; Vojaĝo.  
.....

'6 Al ŝi li donas sian nomon: ; Por fondi  
kune novan domon: ; Domaĝo. ....

'7 Li tiam estas tre utila ; Fortika viro,  
kvankam vila: ; Vilaĝo. ....

'8 Kaj post rapida tempopaso ;  
Postrestas nur senviva maso: ; Masaĝo.  
.....

'9 Ni ne apliku al Virino ; Ĉi tiun viv-  
kaj rimo-saĝon, ; Mesaĝo. ....

'10 Ĉar de l' komenco ĝis la fino ; Ŝi  
ĉiam havas saman aĝon: ; Avantaĝo.  
.....)